

Perdita Vero Redonita

Gilbert W. Scharffs

1-a parto: Kion ni ne scius, se ni ne havus la Libron de Mormon.

"Dankon pro la Libro de Mormon. Mi ne kredas, ke ĝi estas inspirita de Dio aŭ ke ĝi kondukas nin al la Evangelio de Kristo, sed mi ĝojas, ke mi povas uzi ĝin por mia studado pri nekristanaj religioj."

Tion mi legis en letero, kiun ricevis mia edzino kaj mi de virino el la mez-okcidento de Unuiĝintaj Ŝtatoj. Iu donis al ŝi Libron de Mormon, kiu enhavis niajn foton kaj ateston. Kiam post tio mi altelefonis la virinon, ni interparolis kelkan tempon kaj mi demandis ŝin, ĉu mi havas la permeson skribi kaj klarigi al ŝi, pri kio temas en Libro de Mormon. Ŝi konsentis, kaj tial mi skribis por ŝi iom pri la libro, ĉe kio mi aldonis ankaŭ multajn el la sekve prezentotaj instruoj rilate al Jesuo Kristo.

Verdire, dum mia tuta vivo mi verkis la sekvantan skriban ellaboraĵon. Dum mia misiista tempo mi ekkonis, ke la Libro de Mormon per ses manieroj kontribuas al nia kono de Kristo. Ekde tiam (en la lastaj tridek jaroj) la listo ĉiam pliboniĝas, ĉu mi traktis la Libron de Mormon en la instruado aŭ ĉu mi legis ĝin por mi mem. Mi supozas, ke ankaŭ estonte la listo pliboniĝos, se mi legos en la Sankta Skribaĵo, kiu raportas pri la antikva Ameriko.

En vizio Nifai vidis la lastajn tagojn, per ĉi tio li eksciis, ke el la Biblio oni prenos "multajn klarajn kaj multvalorajn instruojn" (1 Nifai 13:28). Mi estas konvinkita, ke la Libro de Mormon ne nur atestas pri Kristo, sed ĝi ankaŭ restarigas multajn el tiuj klaraj instruoj pri Li, kiuj perdiĝis. Ĝi ne nur konfirmas la instruojn, kiujn ni trovas en la Biblio, sed ankaŭ kompletigas ilin.

1-e: La ĉiopardona ofero de nia Elaĉetinto etendiĝas sur tiuj, kiuj mortis sen Leĝo, inkluzive etajn infanojn, kiuj mortis sen baptiĝo.

Multaj kristanoj elbaras ne nur nekristanojn el la efikoj de la ĉiopardona ofero, sed ili kredas ankaŭ, ke nebaptitaj infanoj estas perditaj. La profeto Jakobo instruas, ke, kie ne estas Leĝo, ankaŭ ne estas deklaro pri kulpo, kaj tio pro la kompatemo de Kristo. "Pro tio, li donis leĝon; kaj, kie neniuj leĝoj estas donita, tie ne estas puno; kaj, kie ne estas puno, tie ne estas kondamno; kaj kie ne estas kondamno, la korfavoroj de la Sanktulo de Izrael ampleksas ilin, pro la elaĉeto; ĉar ili saviĝas per lia potenco" (2 Nifai 9:25). La Reĝo Benjamenino parolis pri tio, ke anĝelo deklaris: "Ĉar aŭskultu, ankaŭ lia sango akiras pardonon por la pekaj de tiuj, kiuj falis pro la leĝorompo de Adam, kiuj mortis ne konante la volon de Dio pri ili, aŭ kiuj senscie pekis. Sed ve, ve al tiu, kiu scias, ke li ribelas kontraŭ Dio! Ĉar savo venas al neniuj krom per pentado kaj fido al la Sinjoro Jesuo Kristo." (Mosiah 3:11,12).

Danke al letero, kion skribis Mormon al Moroni, ni scias ke, "infanetoj bezonas nek penton nek baptiĝon. Jen la bapto, estas por penton, por plenumo de la ordonoj, per pardono de pekoj. Sed infanetoj vivas en Kristo, de post la fondiĝo de la mondo; se ne, Dio estas partieca Dio, kaj ankaŭ ŝanĝiĝema Dio, kaj privilegianto de personoj; ĉar kiom da infanetoj mortis nebaptitaj! (Moroni 8:11,12).

2-e: La morto de Kristo sur la kruco efikigis la releviĝon por ĉiuj homoj, kaj tio sendepende de iliaj kredo kaj konduto.

Granda parto el la kristanaro kredas, ke la ĉiopardona ofero de Kristo validas nur por limigita nombro da homoj. Multaj instruas, ke la kredo al Kristo estas necesa por la releviĝo. Aliaj kredas ke la bapto kaj aliaj sakramentoj estas necesaj por la releviĝo. Se Jakobo klare instruas: "Kristo suferas tion (la ĉiopardonan oferon), por ke la releviĝo povu okazi al ĉiuj homoj, por ke ĉiuj povu stari antaŭ li en la granda tago de juĝo." (2 Nifai 9:22). Moroni skribis: "Kaj pro la redempto de la homo, kiu venis per Jesuo Kristo, la homoj estas revenigitaj antaŭ la Sinjoron; jes, en tio ĉiuj homoj estas redemptitaj, ĉar la morto de Kristo efektivas la releviĝon, kiu efektivas redempton el senfina dormo, el kiu dormo ĉiuj homoj vekigis per la potenco de Dio, kiam la trumpeto sonas; kaj ili elvenos, kaj etaj kaj grandaj, kaj ĉiuj staros antaŭ lia baro, redemptitaj kaj liberigitaj el ĉi tiu eterna ligilo de la morto, kiu estas korpa morto." (Mormon 9:13). Tio estas grava kontribuo al la kompreno por la kristana instruo pri justeco kaj favorkoreco.

3-e: La ĉiopardona ofero de la Sinjoro realigis ne nur spiritan sed ankaŭ korpan releviĝon.

Multaj kredas, ke la releviĝo de la homo fare de la ĉiopardona ofero de Kristo ne validas por la korpo. Pri tiu temo ekzistas diversaj Bibliaj tradukoj, kiuj kaŭzas konfuzon. Ekzemple en la "King-James"-Biblio, Ijob 19:26 tekstas jene: "Kaj se ankaŭ post mia haŭto vermoj detruas ĉi tiun korpon, tiam mi tamen en mia karno vidos Dion." Se en la Unueca Traduko, la sama verso tekstas: "Sen mia haŭto, la tiom disŝiregita, kaj sen mia karno mi vidos Dion." [redaktora noto - En la Zamenhofa traduko de la Biblio la traduko estas: "Kaj post kiam mia haŭto estas tiel detruita kaj mi estos senkorpa, mi vidos Dion."] En la Libro de Mormon ne ekzistas konfuzo. Mallonge post la morto de sia patro Lehi, Jakobo diris "... mi scias, ke vi scias, ke nia karno nepre konsumiĝos kaj mortos; tamen, en niaj korpoj ni vidos Dion." (2 Nifai 9:4). Longan tempon poste Amulek instruis: "Nun, ekzistas morto, kiu estas nomita portempa morto; kaj la morto de Kristo malplektos la ligilojn de ĉi tiu portempa morto, por ke ĉiuj estu levitaj el ĉi tiu portempa morto. La spirito kaj la korpo estos rekunigitaj en sia perfekta formo; kaj membroj kaj artikoj estos redonitaj al sia ĝusta korpo, eĉ kiel ni nuntempe estas; kaj ni kondukigis por stari antaŭ Dio, sciante kiel ni nun scias, kaj ni havos klaran memoron pri nia tuta kulpeco." (Alma 11:42,43).

4-e: Kristo suferis tiel forte, ke sango elverŝis el ĉiu poro. La Libro de Mormon klarigas pridisputatan tekstoparton en la Nova Testamento, en kiu temas pri la dimensio "kaj la maniero de suferado de Kristo en la ĝardeno Getsemani: Kaj estante en agonio, li preĝis pli fervore, kaj lia ŝivto fariĝis kiel gutoj da sango, defalantaj sur la teron." (Luko 22:44). Multaj

kristanoj konkludas, ke la ŝvito en tiu ĉi verso estas komparata kun gutoj de sango, do la versoj oni komprenu kiel alegorion. Ili ne kredas, ke Kristo ŝvitigis sangon en sia suferado. Se la Reĝo Benjamenino klare parolas pri tio, kiel anĝelo priskribas la suferadon, kiun Kristo devos preni sur sin: "Li suferos tentojn, kaj doloron de la korpo; malsaton, soifon, kaj laciĝon, eĉ pli ol homo, ne mortante, povas toleri; ĉar jen sango venos el ĉiu poro, tiel granda estos lia suferado pro la malboneco kaj la abomenaĵoj de lia popolo." (Mosiah 3:7).

5-e: La ĉiopardona ofero de Kristo devis plenumi la postulojn de la justeco. Tio estas ĉie konata principo, sed nur en la Libro de Mormon estas dirita, ke la ĉiopardona ofero de la Savinto "plenumis la postulojn de la justeco." (Mosiah 15:9). "Kaj la plano de la mizerikordo ne povus plenumiĝi se pentopago ne estus farita; tial Dio mem akiris pardonon por la pekoj de la mondo, por plenumi la planon de la mizerikordo, por plenumi la postulojn de la justeco, por ke Dio estu perfekta, justa Dio, kaj ankaŭ mizerikorda Dio. (Alma 42:15). Alma demandis: "Kio, ĉu vi supozas, ke la mizerikordo povas prirabi la justecon? Mi diras al vi, Ne; ne unu joton. (Alma 42:25). Per aliaj vortoj, Kristo oferis sin, por ke favorkoreco estu koncedata al ni, se ni obeas Liajn instruojn. Li pagis por niaj pekoj, por ke estu plenumataj la postuloj de la justeco.

6-e: La ĉiopardona ofero de Kristo apartenas al eterna plano, kiu ankaŭ inkluzivas la malobeon de Adam.

Multaj kristanoj vidas la malobeon de Adam kiel priplendindan malfeliĉon kaj kredas, ke Adam kaj Eva estis malbonaj pekuloj kaj la ĉiopardona ofero necesis nur por kompensi ilian kulpon. Pro la ne kompleta raporto en la Biblio, tiu interpretado estas komprenebla.

Feliĉe la Libro de Mormon forigas la miskomprenon inter la malobeo kaj la ĉiopardona ofero. Lehi klarigis: "Se Adam ne estus malobeinta, li ne estus pekinta, se li restus en la Edena ĝardeno. Kaj ĉiuj aĵoj, kiuj estis kreitaj, nepre restus en la sama stato, en kiu ili estis, kiam ili estis kreitaj; kaj ili restus por ĉiam kaj havus nenian finon. Kaj ili ne havus infanojn; pro kio, ili restus en stato de senkulpeco, havante nenian ĝojon, ĉar konus nenian pekon." (2 Nifai 2:22,23). Krome li klarigis, ke tiam ne ekzistus ĝojo, ĉar ne ekzistus mizero, kaj ne virteco ĉar ne ekzistus malbono. Fine ankaŭ ne ekzistus la ebleco, akiri eternan vivon (2 Nifai 2:11-27).

Ekde la kreo de la mondo, jam delonge antaŭ la malobeo, la Savinto estis preparita por sia laboro; nome savi Sian popolon (Etero 3:14). La malobeo kunportis kontrastojn kaj kun tio la eblecon, fari decidojn; la ĉiopardona ofero de la Savinto ebligas al ni fari decidojn, kiuj kondukas al la eterna vivo. "Tial la homoj estas liberaj laŭ la karno; kaj al ili estas donita ĉio, kio estas necesa por homo. Kaj ili estas liberaj elekti liberecon kaj eternan vivon, per la granda Proparolanto de ĉiuj homoj, aŭ elekti kaptitecon kaj morton, laŭ la kaptiteco kaj potenco de la Diablo; ĉar li celas, ke ĉiuj homoj estu mizeraj kiel li mem. (2 Nifai 2:27).

La Biblio neniam parolas pri la malobeo de Adam kaj Eva kaj ankaŭ pri la ĉiopardona ofero de Kristo kiel parto de plano. Kontraste kun tio en la Libro de Mormon ofte estas uzataj

parolturnoj kiel "la plano de nia Dio" (2 Nifai 9:13), la "granda kaj eterna plano pri la elaĉeto" (2 Nifai 11:5), la "plano pri la savo" (Alma 42:8). La termino "plano pri la savo" je la unua fojo estas uzata de Jarom (Jarom 1:2).

7-e: Sen ĉiopardona ofero de la Savinto ĉiuj loĝantoj de la tero estus regataj de Satano.

Nenie en la Biblio estas precize klarigite, per kia potenco Satano povas influi la homon. Sekve plia celo de la ĉiopardona ofero ne estas komplete klarigite. Se Jakob instruis: "Ho, la saĝeco de Dio, lia korfavoro kaj graco! Ĉar ja, se la karno ne releviĝus denove, niaj spiritoj devus submetiĝi al tiu anĝelo, kiu falis de antaŭ la Eterna Diol, kaj fariĝis la diablo, neniam releviĝonta." (2 Nifai 9:8).

Mormon notis la klarigon de Abinadi, ke la diablo havas potencon super la homoj, ĉar la malobeo estas kaŭzo por tio, "ke la tuta homaro iĝis karna, laŭsenta kaj diabla, ĉar ĝi ja povas distingi inter malbono kaj bono, sed tamen ĝi submetas sin al la demona." (Mosiah 16:3).

En la sekvantaj versoj estos montrate, ke la ĉiopardona ofero donas al la homo la eblecon, ke li povas fuĝi el la regado de Satano.

"Tiel do la tuta homaro estis perdita, kaj jen ĝi estus perdiĝinta por ĉiam, se Dio ne estus elaĉetinta sian popolon el ĝia perdita kaj falinta stato. Sed memoru, ke kiu persistas en sia karnodezira naturo, kaj laŭiras la vojojn de peko kaj ribelo kontraŭ Dio, tiu restos en falinta stato kaj la diablo havos ĉian povon super li. Tial la afero aspektas, kvazaŭ estus okazinta neniŭ elaĉeto, ĉar li estas malamiko de Dio; kaj ankaŭ la diablo estas malamiko de Dio. Kaj se Kristo se estus aperinta en la mondo - por paroli pri estontaĵoj, kvazaŭ ili estus jam okazintaj - ĉi-kaze povus esti estinta neniŭ elaĉeto. Kaj se Kristo ne estus releviĝinta el inter la mortintoj, nek disrompinta la ligilojn de la morto, por ke la tombo ne plu havus venkon, nek la morto pikilon ĉi-kaze povus esti estinta neniŭ releviĝo. Sed estas releviĝo, tial la tombo ne plu havas venkon, kaj la pikilo de la morto forglutiĝas en Kristo. Li estas la lumo kaj la vivo de la mondo; ja senfina lumo, kiu neniam povas malheliĝi; ja senfina vivo, por ke ne plu povus esti morto. Kaj eĉ ĉi tiu mortema surmetos nemortemon, kaj ĉi tiu putrema surmetos senputrecon, kaj ĉiuj estos levitaj antaŭ la tribunalon de Dio, por esti juĝata de li laŭ siaj faroj, ĉu ili estis bonaj aŭ malbonaj - Se ili estis bonaj - al la releviĝo al etera vivo kaj feliĉeco; sed se ili estis malbonaj - al la releviĝo de senfina kondamno, transdonite al la diablo, kiu submetis ilin al si, kio estas kondamno. Ĉar ili sekvis sian karnan volon kaj siajn proprajn dezirojn, neniam preĝante al la Sinjoro, dum la brakoj de korfavoreco estis ankoraŭ etenditaj al ili, ĉar korfavoreco etendis siajn brakojn kaj ili ne volis; ili estis avertitaj pri siaj pekoj, sed ili ne deturnis sin for de ili; ordonite penti, ili ne rifuzas penti". (Mosiah 16:4-12). Daŭrigota.

(Gilbert V. Scharffs estis instruisto en l instituto pri religio de la Eklezio en la Universitato de Utaho en Sallaga Urbo. Tradukita el Der Stern, Verlorene Ŭarheit Ŭiederhargestellt (8/89). Izita kun permeso de la Eklezio de Jesuo Kristo de la Sanktuloj de la Lastaj Tagoj.)